# Leciono 9

(Enkonduko por la ekzercoj pretigitaj por la kompleto ***Pasporto al la tuta mondo***)

### *Resumo de la rakonto:*

Ken ekkonstatas ke li amas la vendistinon, Flora Bundo. Oni proponas ke ŝi kombinu sian malsukcesan vendejon kun kafejo por enspezigi pli da mono por kaj ŝi kaj familio Bonvolo. La familio fondas komitaton por decidi kiel aranĝi, nomi kaj malfermi la novan kafejon. Ruselo fariĝas sekretario ĉar li hazarde trovis notlibron taŭga por protokoloj. La detektivo subaŭskultas kaj planas manieron por rehavi sian notlibron. La familio finfine malkovras ke Karlo ne estas "drogaĉemulo", nur malriĉa libromendanto. La doktoro opinias ke eble estas "tro da poetoj" en Esperantio, kaj rifuzas la amon de Karlo. Ŝi donacas komputilon por uzo en la nov-kombinata informejo/kafejo. Ŝi malaperas, kaj Karlo estas tute korŝirita!

### *Resumo de la rakonto laŭscene:*

**Sceno 1:** Flora aranĝas la kafejon kaj la doktoro alportas komputilon.

**Sceno 2:** La detektivo vizitas la hejmon Bonvolo kaj kaŝas sin kiam alvenas familianoj. Filisa pentas, ke ŝi puŝis la detektivon.

**Sceno 3:** Flora timas ĉar ŝi nenion scias pri komputiloj, Ken trankviligas ŝin.

**Sceno 4:** Okazas kunveno de la kafejo-komitato, subaŭskultata de la detektivo.

**Sceno 5:** Karlo haltigas la doktoron surstrate kaj deklaras ke li amas kaj suferas. Ŝi respondas, ke ŝi ne povas helpi.

**Sceno 6:** En la kunsido, oni devas elekti la estraron. Georgo opinias, ke li estos perfekta prezidanto. Tamen, Filisa elektiĝas.

**Sceno 7:** Flora deziras ke Ken deklaru sian amon por ŝi, sed li nur embarasiĝas. Ĉu indas ne pagi elektro-fakturojn? Ĉi-kaze, jes, ĉar pro la mallumo ili trovas unu la alian.

**Sceno 8:** Karlo re-proklamas sian amon por la doktoro. Sed ŝi klare diras, ke tio ne funkcias.

**Sceno 9:** La kunveno daŭras. Ruselo ekestas protokola sekretario, ĉar li havas belan notlibron. La subaŭskultanta detektivo rekonas ***sian*** notlibron. Li foriras kaŝe. Filisa estos kasisto.

**Sceno 10:** La detektivo surmetas barbon. Li elpensis ruzan planon reakiri la notlibron.

**Sceno 11:** La kunsido decidas inviti profesoron Wells malfermi la kafejon. Georgo malkontentas, ĉar li kredas ke fama filozofo pli taŭgas.

**Sceno 12 kaj 14:** Karlo reprovas ĉe la doktoro; ŝi ja ŝatas librojn, sed nur medicinajn librojn, ŝi ne amas poezion kaj ne povas ami Karlon. La vivo de Karlo neniiĝis.

### *Resumo de la gramatiko:*

Ni povas uzi ***ke*** kaj ***ĉu*** en ne-rekta parolado; por esprimi kion oni opinias aŭ scias, ekzemple: Georgo povas diri: "Mi opinias ke mi estos bona kasisto." Sed Filisa dubas ĉu li estos bona.


Simile, oni povas uzi demandajn korelativojn meze de frazo. Ekzemple: Mi scias ke li venos.
Mi scias kiam li venos. Mi scias kiel vi venos; Mi scias kie li alvenos.

Ni lernas novajn korelativojn - ***iom, iom da, tiom, neniel***.

La ĉefa novaĵo estas la sufikso ***-iĝ-***, por indiki ŝanĝon. Ni klarigas ĝin sube kaj venont-paĝe:

### *Esperantaj temoj:*

Am-rilatoj; tre formala Esperanta komitato kaj ĝiaj oficantoj; (eks)prezidantoj de UEA; la poemo de Zamenhof "Ho, mia kor'".



# Trankvile, ĉio klariĝos!

La naŭa leciono prezentas la sufikson ***-iĝ-***. Vi jam renkontis ĝin en kelkaj lokoj. Ekzemple, Ken diris al Flora : "Trankviliĝu!" kaj poste, kiam ŝi eksvenos: "Sidiĝu!"

La sufikso ***-iĝ-*** signalas ŝanĝon. Ekzemple: La knabino sidiĝas (ŝanĝas sin da stara al sida pozicio). En la pasinta tempo, ĝi indikas la rezulton de ŝanĝo: La vetero beliĝis. (Ĝi estis malbela, nun ni havas rezulton, ĝi ekestis bela).

Ni uzas la verbo-formon ***-iĝ-*** kiam pli gravas komuniki pri la procezo aŭ rezulto de ago ol pri la faranto aŭ kaŭzo. Per ***-iĝ-*** ni kreas verbon, kiu estas unu-liga (netransitiva)

| Celo | Komenca radiko | Ekzemplaj radikoj | La konstruata verbo | La signifo |
|---|---|---|---|---|
| 1<br>Montri la ekeston de kvalito | adjektivo | varma<br>trankvila<br>freneza<br>malsana | La akvo varmiĝas.<br>Trankviliĝu!<br>Karlo freneziĝas pro amo<br>Karlo malsaniĝis pro amo | ...ekestas varma.<br>...ekestu trankvila!<br>...ekestas freneza.<br>…ekestis malsana. |
| 2<br>Montri la ekeston de stato | substantivo | amiko<br>fianĉo<br>edzo<br>prezidanto | Ken kaj Flora amikiĝas.<br>Ili fianĉiĝos.<br>Il verŝajne geedziĝos.<br>Georgo volas prezidantiĝi. | ...ekestas amikoj.<br>…ekestos gefianĉoj.<br>...ekestos geedzoj.<br>...ekesti prezidanto.. |
| 3<br>Montri diversajn ekestojn. | sufikso<br>prefikso<br>prepozicio<br>korelativo<br>alia | ar<br>dis<br>kun<br>nenio<br>mult- | La familianoj ariĝas<br>Poste, ili disiĝas<br>Morgaŭ, ili kuniĝos.<br>La vivo de Karlo neniiĝis.<br>La fakturoj multiĝis. | ...venas en grupon.<br>...ekestas disaj.<br>…ekestos kunaj<br>…ekestis nenio<br>...ekestas multaj. |
| 4<br>Montri la ŝanĝitan lokon de io | substantivo kaj prepozicio | sub sofo<br>sur tero<br>en aŭton<br>al salono | La detektivo subsofiĝas.<br>La aviadilo surteriĝas.<br>Ili volis enaŭtiĝi.<br>La bonvolanoj alsaloniĝis. | ...ekestis sub la sofo<br>...ekestis sur la tero.<br>eniri aŭton.<br>venis al la salono. |
| 5.<br>Montri ŝanĝitan staton dum korpa movo | ne-transitiva verbo (stat-montra) | sidi<br>stari<br>kuŝi<br>genui<br>kaŭri | Mi sidiĝas<br>Karlo stariĝas.<br>Georgo kuŝiĝas.<br>Helena genuiĝas.<br>La detektivo kaŭriĝas. | ...eksidas.<br>...ekstaras.<br>...ekkuŝas.<br>…eksidas sur la genuoj.<br>…ekkaŭras. |
| 6.<br>Montri la rezulton de ago. | transitiva verbo | aresti -on<br>konfuzi -on<br>komenci -on<br>perdi- on<br>solvi -on<br>elekti -on<br>aranĝi -on | Ruselo ne arestiĝos.<br>Flora konfuziĝas.<br>La festo komenciĝos.<br>La notlibro perdiĝis.<br>La problemoj solviĝos.<br>Prezidanto? Filisa elektiĝis.<br>Aferoj aranĝiĝos. | ...estos arestita.<br>...estas konfuzita.<br>...estos komencita.<br>…estas perdita.<br>…estos solvitaj.<br>…estas elektita.<br>…estos aranĝitaj. |

En kazoj 1 ĝis 5, la signifo de ***-IĜ-*** tre similas al ***EK-***. En kazo 6, ĝi similas al pasivo.

Ni normale ne uzas ***-iĝ-*** kun aktivaj netransitivaj verboj, ĉar ŝanĝo al ago estas malfacila koncepto. Prefere uzu "ek-", ekzemple: La trajno ekiras. La kuniklo ekaperas.

Vi rajtas apliki la transformojn en la vicoj 1-5 nur ĉe radikoj kiuj ne havas verban formon, aŭ en kiu la verbo indikas nur staton. Ekzemple: *La manĝo pretiĝas* deriveblas el *La manĝo pretas,* ĉar la verbo *preti* signifas nur *esti preta*. Sed, se ekzistas por la radiko verbo kun aktiva signifo, vi devas uzi la transformon en vico 6. Ekzemple, "tru-" estas substantiva radiko, sed ekzistas verbo "trui". Ĝi ne signifas "esti truo" sed "fari truon". Do, "truiĝi" ne signifas "ekesti truo" sed "esti truita". Simile pri "diplom-" kaj "interes-"

En simplaj frazoj, iuj trovas strange uzi ***-iĝ-*** por procezo kiu klare havas homa(j)n plenumanto(j)n, ekzemple: La ponto konstruiĝis. La televidilo ripariĝis. La strangeco malaperas kun aldono de kunteksto, ekzemple: Ĝis la ponto konstruiĝis en la okdekaj jaroj, la vojo estis 20 km. pli longa. Feliĉe, la televidilo ripariĝis matene, do ni povos rigardi la futbalon vespere.